



# ELNA-BULTENO

## ESPERANTO-LIGO POR NORDA AMERIKO

Numero 8(71)

Majo 1971

### ELNA-ARKIVAĴOJ VIDIĜIS EN PUBLIKA BIBLIOTEKO EN CALIFORNIA

D-ro B.J. Balcar, ELNA-Arkivisto, aranĝis belan montraĵon en la publika biblioteko de Monterey, Cal., dum februaro. Loka ĵurnalo (Monterey Peninsula Herald) raportis, ke la kolektaĵo enhavas vortarojn, gazetojn, poŝtmarkojn, fotojn. Ĝi okazis samtempe kun komenco de klaso ĉe Pacific Grove Adult School.

### ESPERANTISTOJ DE PORTLAND, ORE., LERNIS PRI KULTOJ KAJ AŬTOMOBILOJ

Anoj de la Esperanto-Asocio de Portland, Ore., dum la aprila kunveno, la 19an, ĝuis Esperantan filmon pri aŭtomobiloj Fiat (Italaj), kaj aŭdis ankaŭ lertan paroladon de S-ro Joe Gamble pri "Esperanto kaj Kultoj."

### BONA SUGESTO VENIS EL WASHINGTON PRI KUNLABORO EN LA MOVADO

Sara Ann kaj Albert Estling (Walla Walla, Wash.) pensas, ke, ĉar celas ni instrui Esperanton en lernejoj, kaj, ĉar lernejestroj nuntempe kiuj starigis klasojn estas "pioniroj," kaj bezonas subtenon, ELNA-anoj devas sendi aŭ gratulkartojn aŭ mallongajn leterojn al la estroj, kiuj jam faris ĝin! "Por ekruli la pilkon," ili diris, "bonvole skribu karton al S-ro Tom Chandler, Principal, Sager School, College Place, Wash. 99324."

### KATOLIKA ESPERANTISTO PAROLIS EN OHIO PRI INTERNACIA LINGVO

La loka ĵurnalo en Warren, Ohio (Tribune), raportis, ke S-ro Edwin Huffman de Youngstown, Ohio, prelegis la 26an de aprilo pri la temo, "Avantaĝoj de la Internacia Lingvo Esperanto." Oni diras, ke S-ro Huffman uzas en vojaĝado plurajn lingvojn, sed precipe laŭdas la emon al paco kaj mondunueco, kiun oferas al la homaro la internacia lingvo Esperanto.

### LERTA ESPERANTISTO EN INDIANA VERKIS ESPERANTAĴN ARTIKOLOJN

Adolf Holzhaus, 2748 Orchard Lane, Columbus, Ind. 47201, kiu verkis jam multajn artikolojn, finigis verkaĵon pri "L. Zamenhof: Originalaj kaj Tradukitaj Poemoj." Estonte, se permesas la spaco, ELNA-Bulteno esperas ricevi permeson inkluzivi elĉerpaĵojn.

### OBJEKTO DE HISTORIA INTERESO EN LA MOVADO VENIS AL USONO

La ELNA-Sekretario ricevis personan donacon de Harold Goulds, Hardy, Ark.; kravatpinglon el la posedo de sia amiko, Joseph Rhodes, Esperanto-pioniro kiu fondis la unuan grupon en Anglujo. S-ro Goulds persone konis ankaŭ Kolonelon Polard, frua prezidanto de la Brita Esperantista Asocio.

### UEA FARIĜIS KANDIDATO POR LA FAMA NOBEL-PACPREMIO

Individuoj, organizoj, institucioj, kaj eĉ parlamentanaroj, el pluraj landoj, kandidatigis la "Universala Esperanto-Asocio" por la Nobel-Pacpremio. D-ro Lapenna, prezidanto de UEA, diris, ke "eĉ se UEA denove ne ricevos la premion, la kandidatigo mem, kaj la gazetraportoj, estas pli ol utilaj por la pozicio de la Asocio por la prestiĝo de la lingvo."

### KONATA VERKISTO HELPIS EN LA VARBADO EN ARIZONA

Loka ĵurnalo en Yuma, Ariz. (Sun), antaŭ nelonge enhavis specialan artikolon pri Esperanto, en kiu estis foto de S-ro Charles Mann, parolisto kaj verkisto kiu antaŭe loĝis en San Diego, Cal.

### PETO PRI UZO DE LITERUMA ALFABETO EN ESPERANTUJO

Kvankam la ELNA-Bulteno ne havas sufiĉan spacon por la plena raporto de S-ro Bonnie J. Chambers, 1740 Nakula St., Wahiawa, Hawaii 96786 (VID.Num.7(71) Marto), ni ĉifoje inkluzivis la alfabeton finpaĝe, kaj ni petas ke vi helpu la diskonigon de la alfabeto tra la radioamatora mondo.

# ELNA-BULTENO

**KUNFONDINTOJ** Donald Munro +  
Rodney Ring

**ADRESO** ELNA-Bulteno  
Muhlenberg College  
Allentown, Pa. 18104

## SESA SEMINARIO DE ESPERANTO EN RIO DE JANEIRO

De la 22a ĝis la 25a de julio, 1971, okazos la Seminario de Esperanto, kiu anstataŭis la brazilajn kongresojn (kiuj tie de pluraj jaroj ĉesis efektiviĝi). Ili petas, ke vi sendu du poŝtkartojn de via urbo, aŭ, se tio ne eblas, du ordinarajn fotojn de la pejzaĝo, kies dorsflanko enhavas klaran prikskribon en Esperanto, por ke ili povas uzi tion por ekspozicio, en kiu ili povas doni al la publiko ian pruvon pri la praktika utileco de la lingvo. Sendu al: Vivaldo Marcelino da Silva, Banco do Brasil, Campos (RJ), Brazil.

## 31A KONGRESO HISPANA DE ESPERANTO EN JULIO

En Alicante, Hispanio, dum la tagoj 19a ĝis 24a de julio, eksterlandanoj estos akceptitaj "senpage" (ili pagos nur t.n. "insignon") ĉe la 31a Hispana Kongreso. Adreso de la delegito por la afero: Miguel Manteca, Plaza de los Luceros, 7, Alicante, Spain.

## NEKREDEBLA MALALTKOSTA OKAZO POR STUDI ESPERANTON KAJ ĜUI FERION

Kvankam ĝi estas malantaŭ la fer-kurteno, en Pamporovo, Bulgario, ekzistas "Internacia Kurso Por Progresintoj," kiu estas preskaŭ miraklo, laŭ la opinio de D-ro P. J. Burke, Ĉambro 2B414, Bell Telephone Lab., Holmdel, N.J. 07733. Oni preparas nun por pluraj aĝgrupoj kaj studniveletoj, dum pluraj datlimoj, dum la venonta somero. Informojn vi povas ricevi aŭ de D-ro Burke, aŭ rekte de la Distrikta Esperantista Komitato, Smoljan, Bulgaria SSR.

## INTERNACIA KONKURSO DE INFAN-DESEGNAĴOJ

En oktobro, 1971, kunlabore kun la loka Ŝparkaso de la urbo Sabadell, Hispanio, okazos konkurso interesa! Ĉiuj mondinfanoj povas partopreni. La desegnaĵojn oni povas sendi antaŭ la 30a de aŭgusto, pri libera temo, sur blanka papero (21x29 centimetroj) kaj kiu ajn tutkolora tekniko. Oni kvitancos ĉiujn sendaĵojn kun eventuala kompenso, sed ne redonos ilin. Oni premios ĉiun aĝgrupon 4-6, 7-9, 10-12, per tri kvalitaj premioj. Sendu al Centro de Esperanto Sabadell, Strato General Mola, 99, Sabadell, Spain.

\* \* \* \* \*

ELNA-Bulteno petas, ke vi legu ĉi tiun belan verkaĵon de S-ro Mark Mandel en la originala formo ĉi tie, kaj, ke vi komparu ĝin kun la erarplena formo de la marta numero (7(71), p.4). La eraroj ŝanĝis la sencon. Ni petas pardonon!

Iu prahom' rigardis ĉirkaŭ si  
kaj vidis la leonon kaj la monton,  
l' arbaron kaj l' ĉielan pluvofonton,  
kaj, en la nord' , la klifojn el glaci'.

Li miris, kaj li timis pro nesci' ,  
vidante post la ŝtorm' la Songoponton,  
serĉante kies kreinton kaj paŝonton  
li volis Dion; kaj fariĝis Di' .

Sed nun mi aŭdis ke, post tiu Far'  
tiranta Homon el la lago ŝlima  
ni pelis Dion for, el la kredar' .

Neniam estos jet' per mi intima  
aŭ ŝtalturaro en soldata star' :  
Ĉio ne-Dia estas neanima.

## NI KORESPONDU

45-jara teknikisto en aŭtomobilfabrikejo, edziĝinta, kiu priskribas sin per "tolerema," kaj "liberpensulo," vivas apud parizo, kaj deziras havi korespondantojn. S-ro R. Geraud, 6 Rue du Bois Jacques 95, Eaubonne, France.

Hispana Esperantistino, delonga kaj aktiva samideanino, volas korespondi kun usonanoj (aĝo ne gravas) pri ĉio, escepte politiko aŭ religio. F-ino Herminia Gil, Lausana 5-40-C, Zaragoza, Hispanio (Spain).

32-jara estona instruisto deziras usonajn amikojn. Ahto Kaljusaar, Pohja 2-3, Viljandi 202900, Estonio (Estonia) SSR.

Kursgvidisto serĉas gekorespondantojn por la gekursanoj (15-40 jaraj), kiuj estas plejparte geinstruistoj. Respondo certe. S-ro Ĥristo Dolĉinkov, Str. D. Ivanov 7, V. Tirnova, Bulgario (Bulgaria).

La Ĉeĥa korespondantaro anoncis, ke, bedaŭrinde, ekde nova jaro, ege altiĝis poŝtaj tarifoj, por transmoro, ekzemple, eĉ sepoble, kaj, do, se oni ne ricevas respondon, jen la kialo. Oni esperas, ke ĝi ŝanĝos en tiu lando baldaŭ, sed dumtempe, oni sugestas, ke grupo skribu laŭ unuo.

Gimnazia instruisto, kies filo estas granda matematikisto, fiziko, kaj kemisto, volas interŝanĝi leterojn kun usonanoj. S-ro Ivan Gancev, Georgiev Str. N., Republika No. 38, Tolbukin, Bulgario (Bulgaria).

La plej nova brazila ek-gelernintaro serĉas usonajn gekorespondantojn! Naŭ: 16-jara fraŭlo, Jorge Carlos Pereira Felipe, Rua Belo Monte 561, Rocas Natal R. N., Brazilo; 13-jara fraŭlino, Eloine Maria Costa, Rua Otoniel Menezes, 292, Stos Reis, Rocas Natal R. N., Brazilo; 20-jara fraŭlino, Icleia Maria da Silva, Rua Belo Horizonte 360, Rocas Natal R.N., Brazilo; 16-jara fraŭlino, Ivonilda da Cordula, Rua São Francisco 25, Rocas Natal R.N., Brazilo; 22-jara fraŭlino, Edna M. B. Santos, Rua São João 160, Rocas Natal R. N., Brazilo; 27-jara fraŭlino, Nilza V. Dantas, Rua Otoniel Menezes 66A, Stos Reis - Natal R.N., Brazilo; 13-jara fraŭlino, Telma M. Cruz, Rua São Francisco 13, Rocas Natal R.N., Brazilo; 16-jara fraŭlino, Maria C. Souza, Rua São Sebastião 73, Rocas Natal R.N., Brazilo; 21-jara fraŭlino, Maria da Luz, Rua Lucas Bicalho 70B, Rocas Natal R.N., Brazilo (Brazil).

Hispana Esperantisto deziras usonajn korespondantojn (aĝo 24-55). S-ro Eduardo Soteras, Rambla 46-10, Alicante, Hispanujo (Spain).

46-jara konstruingeniero volas korespondi. S-ro Edward Markiewicz, Londynska 14 M 32, Warszawa (Warsaw) 33, Pollando (Poland).

Mezaĝa viro, kiu interesiĝas en "Lingvoponto" (Klubo en sia vilaĝo), petas, ke ni trovu korespondantojn. S-ro Pauli Halonen, Sibeliuksenkatu 24, Kuopio, Finnlando, (Finland).

17-jara gimnazia studento, kiu interesiĝas en preskaŭ ĉio, atendas viajn leterojn aŭ kartojn Gyula Miŝi, Novak Gyula 7, Budapeŝt XI, Hungario.

Sola, mezaĝa instruistino el Hungario serĉas novajn korespondamikojn. Roza Halasz, Salgotarjan Pt. 102, Hungario (Hungary).

38-jara rusa kuracisto, fraŭlo kiu ĵus lernis Esperanton, deziras korespondi kun usonanoj. D-ro Aleksandr N. Bogdanov, Do Vosejrebovanie, Kiev 3, Sovetunio (Soviet Union).

Junaj 13-jaraj degrupanoj el la urbo Vsetin, Ĉeĥoslovakio, deziras korespondi: Irena Kočibova, Mala Bytřice 153; Eva Malinova, Valasška Bytřice 85; Eliška Přidalova, Valasška Bytřice 518; Eliška Křinkora, Valasška Bytřice 572; Ludmila Štuskova, Mala Bytřice 100; Alena Mikolašova, Mala Bytřice 19; Alena Tepla, Mala Bytřice 3. (Ĉiuj "okres Vsetin, Czechoslovakia).

Laŭ la vortoj de la franca revolucio, estas pli malfrue ol oni konscias. Homo frontas la danĝeron de sin-ekstermigo. Li povus malaperi de sur la tero, kiel la dinosaŭro, la dido, kaj pluraj aliaj forpasintaj specioj.

Ni pensu pri ĉi tiu mirinda estaĵo: homo. Kio li estas? Biologie, homo estas vertebrulo, de la mambestaro, vivonaska, dupieda, en la ordo de primatoj. Li naskiĝas en kelkaj koloroj: nigra, bruna, rozkolora, blanka, kaj kun intermiksaj nuancoj. Li estas ĉiomanga besto. Sed, li estas besto kun ĉi tiu diferenco: li povas ŝanĝi sian propran medion. Bedaŭrinde, ĉi tiu ŝanĝpovo enhavas la malavantagon, ke li devas ankaŭ suferi ĉiujn rezultojn de sia propra elektkapablo. Konsideru nur ses el la multaj rezultoj kaj eblecoj:

Unue: Laŭ historistoj, iam homo estis simpla arbloĝanto, svinganta per sia vosto en paradizo de kokosoj kaj bananoj. Ne kontenta, li malsupren grimpis, kaj eklernis piediri malantaŭpiede sur la tero. Lerte, ĉu ne? Sed pripensu la koston: pro tiu nova vojaĝmaniero, li de tiu tempo eterne perdis sian mirindan voston.

Due: Nun, piedirante sur la grundo, li sentis la mankon de folioj por ŝirmi sin, kaj li do inventis vestojn. Bona ideo, ĉu ne? Sed pripensu la koston: Nun li devas pagi multe da mono por esti en bona modo - kun ĉapelo, jaketo, pantalono, ĉemizoj, kaj manubutoj! Kaj tio estas la malpli serioza kosto; la plej grava kosto estas, ke, pro la konstanta uzo de vestoj, li perdis sian propran felon. Nun li tute dependas de vestoj. Se iel ajn li ne povas havigi al si vestojn, oni horortremas pri lia malfeliĉa stato.

Trie: Iam homo havis nur lingvon de gestoj kaj gruntoj. Ĉiuj povis ĝin facile kompreni. Sed ĉi tiu lerta besto inventis lingvon de vortoj, kaj poste evoluigis pli ol tri milojn da komplikitaj vortlingvoj. Vere, estis mirinda faro - sed pripensu la koston: Nun li ne povas kompreni fremdajn lingvojn, kaj multe pagas kaj suferas pro manko de interkompreniĝo.

Kvare: Li inventis la kuirarton. Ho, kiel bongustaj estas rostviando, pasteĉoj, kukoj, kandoj! Sed pensu pri la kosto: lia kromstomako degeneris. Ĝi iĝis la vermoforma apendico, senutila, ĝenoplana. Kaj ankaŭ liaj dentoj kariigis. Kiam li maljuniĝas, necesas, ke li maĉu per multekosta falsdentaro.

Kvine: Iam ĉio estis senkosta, kaj la homo nur bezonis kapti la bezonaĵon, aŭ memfari ĝin. Sed la lerta besto ne estis kontenta, kaj inventis komercon per mono. Kia granda eltrovo ĝi estis! Ĝi tre multigis faritaĵojn. Sed, ho ve, nun li similas al hundo ĉasanta sian voston sensukcese. Por aĉeti la faritaĵojn, li devas labori por gajni monon, kaj la mono neniam estas sufiĉa por aĉeti la deziratajn faritaĵojn.

Ses: Ne kontenta esti nur natura besto, li iĝis scienca besto. Ho, kiaj mirindaj eltrovaĵoj kaj inventaĵoj estis elpensataj! Li elpensis batalilojn el ŝtonoj, ligno, fajro, kemioj. Li elpensis labori kaj vojaĝi per maŝino; li eltrovis sendi voĉojn kaj bildojn tra la aero; fine, li elpensis kaŭzi nukleajn eksplodojn. Sed - ho ve - vidu la ne-eviteblajn kostojn! La bataliloj murdis amikojn; per la maŝinoj li malpurigis la aeron ĝis ne-spirindeco; per televido li narkotis sian menson; kaj, pro la nuklea elpensaĵo, li devas post tiam eterne vivi en timo.

Tia estas tiu rimarkinda besto. Ĉu eble li iĝos sufiĉe lerta - sufiĉe frue - por eviti la sorton de la dinosaŭro kaj la dido?

Kiu scias? Kioma horo estas?

#### KAMPARA RAKONTO

La nuntempa kamparlando havas ne nur laborevitajn aparatojn, aŭtomatajn rimedojn, kaj amuzelpensaĵojn (kiel televidon), sed ankaŭ ofte havas radioricevilojn.

En mia domo, kaj en tiuj de la najbaroj, estas la tielnomita "Radiostrio por ordinaruloj" (angle, "Citizen's Band"), por ke ni povas interkomuniki voĉe trans mallongaj distancoj (15-20 anglajn mejlojn). La registraro transdonas al ni licencojn, kiuj permesas radian interparoladon kiam telefonkonversacio estas maloportuna aŭ ne-ebla, kondiĉe ke ni uzu la cifrojn, por identigi nin, kiujn la Komisiono Registrara aldonas kune kun la permeso oficiala.

Kutime, kiel en mia familio, estas fiksita aparato en la kuirejo, kaj kelkaj ne-fiksitaĵoj, moviĝantaj aparatoj en la veturiloj de la farmbieno. Ofte helpas al ni kiam edzo aŭ edzino foriras al la kampoj, al la lernejoj kun infanoj, aŭ al la urbo. Ĝi estas preta por urĝecaj situacioj, kaj estas komfortilo dum ni prizorgas la aferojn de la ĉiutaga farmlaboro.

Ni ankaŭ havas "L.P." (laŭtparolilon), kiun ni kunigis al la ekstera parto de la domo, por ke ni povas alvoki iun en la kampoj, aŭ en eksteraj farmkonstruaĵoj, se, ekzemple, oni telefonus hazarde dum la laborhoroj.

Unu tagon, dum neĝstormo, mi venis hejmen kun la timo, ke mi ne povus atingi la domon. Mi do sugestis, per la aparato, ke la edzino informu la filon, per "L.P." por ke li renkontos min kun neĝveturilo. Ŝi konsentis, sed ŝi ne sciis kiel funkciigi la "L.P." Detalajn instrukciojn mi do donis al ŝi, kaj ŝi alvokis laŭtparolile la filon.

Tuj, tamen, ŝi anoncis, ke ŝi ne povas reŝanĝi la aparaton, por ricevi interne en la domo! La tuta konversacio venis per la "L.P.," kaj necesas, ke la fenestro restu malfermata, por ke ŝi aŭdos la instrukciojn.

Subite, eble pro la ŝtormo, ni spertis la fenomenon nomitan "resalto." Tiu okazas kiam radiaj ondoj resaltas de la jonosfero kaj revenas aliloke, kaj kaŭzas entrudiĝon. Ĉifoje la ondoj venis el Kubo, kaj voĉegoj kriegis hispane tra nia "L.P." en la domkorto! Kompreneble nia farmbestaro kutime ne aŭdas tiajn vortojn, kaj, antaŭ ol mi rekontaktis ŝin, la bestoj timiĝis, kaj foriris el la enfermaĵoj, kaj la neĝo tra la fenestro plenumis la kuirejon! La riparado de la difektiĝo daŭris horejn. Hodiaŭa vivo ne estas bona.

#### KARCEROJ KAJ MALLIBEREJOJ

Leĝaj aŭtoritatuloj ofte kondamnas al mallibereco tiuj kulpigitaj pro gravegaj krimoj. Modernaj malliberejoj, laŭdiraj "gardiloj de socio," estas instrumentoj intencitaj laŭ tri teorioj: 1) ke la kulpulo rekompencos socion pro sia perforteco kontraŭ la reguloj, 2) ke krimontoj instigiĝos ne fari malbonon, 3) ke ĉiuj reformiĝos kaj restariĝos.

Malliberejoj, kiel institucioj, havis komencon antaŭ nur 200 jaroj. Ĝis la 18a jarcento oni punis la kulpulojn kutime per korpa puno, morto, ekzilo, sklaveco, aŭ deviga laboro. La malliberejoj estis ĉefe por atendi la akuzitojn ĝis proceso, direkti devigan laboron, enfermi politikajn malamikojn, aŭ (kiel en Anglujo) havigi pagon el ŝuldantoj.

Hodiaŭ la karceroj (angle, "jails") estas ejoj por atendi akuzitojn ĝis proceso, aŭ puni personojn, kiuj ricevis juĝon je malpli ol unu jaro, sed la malliberejoj (angle, "prisons") estas por krimuloj, kiuj faris la gravegajn agojn, pro kiuj ili estas kondamnitaj je pli ol unu jaro (angle, "felony").

La institucioj estas rezulto de la ideoj de William Penn kaj kvakeroj. La intenco estis haltigi la tiaman kruelecon, ĉar oni kutime bategis, skurgi, mutilis, brulmarkis, humiligis, kaj mortigis la kulpulojn. La kvakeroj deziris helpi la ofendintojn, ke ili sentu penitecon (do, angle, "penitentiary"). La plej frua koncepto estis, ke ĉiu malliberulo restu en karcero kun stangoj je la fenestroj. Ĉi tiu nomiĝis la "Pensilvania Sistemo."

Konstruiĝis, tamen, en 1816, punlaborulejo en Auburn, "... laŭ alia ideo: permesi pli da krimul-interrilatoj, kaj emfazi produktan laboron anstataŭ punon aŭ devigan penitecon. En 1870, en Elmira, N.Y., oni komencis sistemon en kiu "reformo" estis la unua celo, kaj oni postulis, ke ne ekzistu tie subpremo. Ili serĉis restatigon de kulpuloj.

Inter 1875 kaj 1900 oni plibonigis la traktadon de junaj malliberuloj, kaj decidis, ke industriaj preparejoj estas plibonaj ol karceroj. Hodiaŭ ofte ili loĝas en "dometoj" anstataŭ en grandaj konstruaĵoj, kaj oni kutime emfazas honorpromeson. Laŭ la nuna teorio nur la neŝanĝebluloj aŭ veraj nebonigebluloj devas esti en malliberejo.

---

 O F I C I A L A    E L N A - A D R E S A R O
 

---

PREZIDANTO

Francis E. Helmuth  
5526 Beaumont Ave.  
La Jolla, Cal.  
92037

VICPREZIDANTO

Mark Starr  
3940-47th St.  
Long Island City  
New York, 11104

SEKRETARIO

Conrad Fisher  
Route 1  
Meadville, Pa.  
16335

KASISTINO

Peggy Linker  
1414 Monroe St.  
Walla Walla, Wash.  
99362

KORESPOND-DIREKTORINO

Ellen A. Lewis  
15 Salisbury Rd.  
Brookline, Mass.  
02146

UEA-ĈEFDELEGITO

Armin Doneis  
P.O. Box 105  
Pharr, Texas  
78577

INFORMCENTRO

OKCIDENTA  
410 Darrell Road  
Hillsborough, Cal.  
94010

ARKIVISTO

D-ro B. J. Balcar  
62 Via Castanada  
Monterey, Ca.  
93940

INFORMCENTRO

NOVJORKA  
156-5th Ave. Rm. 821  
New York, N. Y.  
10010

---

 ESPERANTA LITERUMA ALFABETO UNIVERSALA POR RADIOAMATOROJ
 

---

Alfa	Hotelo	Oktobro	Viktoro	Ø	nulo
Bravo	Ĥaoso	Papa	W ŭiski	1	unu
Cigareto	Indiana	Q Kŭebek	X eks-rej	2	du
Ĉefo	Juliet'	Rekordo	Y janki	3	tri
Delta	Ĵurnalo	Sofa	Zuluo	4	kvar
Eko	Kilo	Ŝilingo		5	kvin
Floro	Luna	Triumfo		6	ses
Galono	Maŝino	Uniformo		7	sepen
Ĝirafa	Novembro	Ŭ uniformo-hoko		8	ok
				9	naŭ



ESPERANTO LEAGUE for NORTH AMERICA  
156 FIFTH AVENUE, NEW YORK, N.Y. 10010

NON-PROFIT ORG.  
U. S. POSTAGE

**Paid**

Kutztown, Pa.  
Permit No. 8

RETURN POSTAGE GUARANTEED  
ADDRESS CORRECTION REQUESTED